Aŭtuno 2009
Kajero 2 aŭ 3

# Oni Diras Nun!

Sendependa Gazeto de la Esperanto-Movado
http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/

# Katastrofo post Landa Kongreso!

## Pingvinoj Mortas Amase

Saint Louis



Mortis dekoj da pingvinoj pro katastrofo post la usona landa kongreso. Dum post-eksurso de la kongreso, okazis terura akcidento je la ekskurs-aŭtobuso. Post la solena fermiĝo de la usona Landa Kongreso, 18 partoprenintoj veturis per aŭtobuso al la Sankta Luisa Bestoĝardeno.

La gvidanto de la ekskurso estis d-ro Ronald Glossop, honora membro de Esperanto-USA. Dum la 10-minuta vojaĝo al la bestoĝardeno, d-ro Glossop alparolis al la kondukisto kaj lernis, ke li ne sciis kio estas Esperanto. D-ro Glossop komencis klarigi pri la Internacia Lingvo kaj, preskaŭ tuj, endormigis la kondukiston.

Bonŝance, la aŭtobuso estis jam preskaŭ ĉe la bestoĝardeno kaj ne estis sur ŝoseo. Tial, la aŭtobuso movis malrapide kaj kiam okazis la akcidento, neniu estis mortigita nek eĉ vundita. Kelkaj eĉ ne vekiĝis. Bedaŭrinde, tamen, la aŭtobuso trafis kaĝon kaj liberigis tri leonojn. La leonoj manĝis la mond-konatajn pandojn kaj pingvinojn de la bestoĝardeno.

La leonoj ankaŭ devigis ke la esperantistaro restu en la aŭtobuso dum tri horoj. Ili nepre estus perdinta la esperon, krom pro la instigo de Donaldo Vreelando, kiu multfoje vokis al oni fojon post fojo kanti "L' Esperon."

## Esperanton Parolas Fremduloj

Rochester



Esperanto-parolanto Thomas Alexander ricevis teruran ŝokon kiam li lernis antaŭnelonge ke ne ĉiuj Esperanto-parolantoj estas usonanoj.

"Mi partoprenas la usonan Esperanto-movadon dum multaj jaroj kaj neniam renkontis ne usonanon. Mi partoprenis du, tri landajn kongresojn. Mi tamen ofte venas post la interkona vespero kaj devas foriri iom frue.

Alexander ege surpriziĝis kiam li promenis en sia hejmurbo. "Mi renkontis fremdulon," li diris. "Estis eksterlandano kiu parolas Esperanton. Kaj li parolas ĝin tre bone! Mi havis nenian ideon."

Daŭrigante, li diris, "Kompreneble, li parolas ankaŭ la anglan."

Ĉe la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto, Alexander konfesis ke li ofte renkontis kandananojn. "Sed ĉiuj scias ke tiu ne vere estas alia lando," Alexander rimarkis. "Usono nur ŝajnigas tion, por ke Kanado ne malaltigu la valoron de la usonaj terpecoj."

Montriĝas ke multaj usonaj Esperantistoj tute ne scias ke, ekster usono, ekzistas Esperanto-movado kaj eksterlandanoj kiuj parolas la lingvon de Zamenhof.

Kelkaj homoj, kiam ili lernis ke fremduloj parolas la lingvon, tuj anoncas sian eksiĝon de la movado. Ne ĉiuj pensas tiel. "La fakto ke kelkaj fremduloj parolas Esperanton tut ne estas kialo eksiĝi al la Esperanto movado," diris Ben Stevens. "Ne estas kvazaŭ ni parolas pri Francoj!"

# Darsi Faras Miraklojn ĉe LK!!



**Darsi Faras Miraklojn ĉe LK!!**

Sankta Luiso

Darsi Ross mirigis ĉiujn samideanojn ĉe la usona Landa Kongreso kiam ŝi venis kaj komencis fari miraklojn. Kun ŝi venis kvin studentoj kiuj akompanas ŝin ĉie. "En Darsi ni fidas," diris unu dum kafpaŭzo dum la kongreso. La aliaj ĉirkaŭe kapjesis.

Darsi kaj kvin studentoj forlasis Chicagon en aŭto kun sufiĉan benzinon nur por veturi duonon da la 300 mejloj al Sankta Luiso. La studentoj ne havis monon por aĉeti pli da benzino. Darsi faris miraklon kaj la benzino sufiĉis por ne nur iri al Sankta Luison, sed ankaŭ pluiri al ŝia somera hejmo en Champaign, Ilinojo. Sen ŝia mirakla subteno, la studentoj estus perditaj sur la vojo sen la ebleco aŭ atingi la celon aŭ reveni hejmen.

Iuvespere dum la kongreso, la studentoj ne havis falsan identigilon por aĉeti alkoholaĵojn kaj estis malfeliĉaj. Darsi faris miraklojn por ŝanĝi la akvon en sufiĉan bieron por ke la studentoj festu ĝis la frua mateno.

Kaj je la sekva mateno, kiam la ebriaj studentoj dormis kiel mortintoj, ŝi levis ilin por ke ili ne mistrafu siajn ekzamenojn. Kaj per ŝia beno, ili ĉiuj sukcesis je siaj ekzamenoj malgraŭ la festado de la antaŭa nokto.

La aliaj partoprenantoj de la Landa Kongreso ankaŭ ekfidas je Darsi. Oni alportis al ŝi donacojn da mono kaj libroj. Oni antaŭvidas ke Darsi gvidos la esperantistojn al la promesita lando per fina venko.

Oni diras, ke aŭreolo ĉiam videblas ĉirkaŭ ŝian kapon. En fotoj, tamen, ĝi laŭraporte ne aperas.

## Filipo Dankas Ĉiujn

Sankta Luiso




Ĉe la fino de la Landa Kongreso, la Prezidanto de Esperanto-USA, Filipo Dorcas, dankis multajn homojn. "Mi estas tre dankema pro la bona kongreso," li diris. "Kaj mi volas danki ĉiujn!" Li unue dankis Boris Kolker, la gast-preleganto. Li dankis la loka kongresa komitato, Ron Glossop, Jeff Wilson, Jerry Johnson, Dave Fallert, kaj Peggy Dolter. Kaj li dankis Jim Henry kiu longe servis kiel estro de la Daŭra Kongresa komitato. Li dankis Bill Harris, la direktoro de la Centra Oficejo. Li dankis Darsi kaj la studentoj pro ties laboro je la kaf-paŭzoj ĉe la kongreso. Li dankis Ellen Eddy pro ŝia longa servo kiel kunordiganto de la NordAmerikan Someran Kursaron. Li dankis Anna Bennett pro ŝia longa laboro kiel kasisto. Li dankis la pasintajn estraranojn, Lusi Harmon, Joel Amis, kaj Trevor Andrews. Li dankis la novajn estraranojn, Julie Winberg, Tor Kinlock, kaj Orlando Raola. Li dankis al Jacob Schwartz kiu estros la kandidatigan komitaton venontajare. Li dankis lian edzinon, Beth Dorcas. Tiam li dankis ĉiujn ĉeestantojn, unuope per nomo. Kiam li ekprenis la telefon-libron por danki al ĉiuj homoj de Sankta Luiso pro ties gastigemo, oni komencis kaŝe foriri la ĉambron unuope kaj duope, lasante s-ro Dorcas finfine en malplena ĉambro dum li dankis ĉiujn. Eĉ la venontan matenon, dum la lastaj ĉeestantoj eniris la buseton por iri al la flughaveno, oni ankoraŭ povis aŭdi lin en la malhela kongresejo, dankante al pli kaj pli kaj pli da homoj.

### Lup-KnaboLernasEsperanton

Vankuvero

Antaŭ unu jaro, knabo estis trovita en Kanado kiun vartis la lupoj post la morto de lia patrino dum tra-arbara vojaĝo. La tiel-nomata lupknabo tute ne povis paroli en homaj lingvoj, do kuracistoj decidis instrui al li Esperanton ĉar ĝi estas la plej facila lingvo. Post ses-monata studado, la lupknabo povas bone paroli la lingvon.



Ni havas ekskluzivan intervjuon kun la lupknabo en nia gazeto.

*Kion vi plej ŝatas pri homa civilizacio?*

Mi ŝatas iri eksteren. Mi ŝatas ĉasi pilkon. Ĵetu por mi pilkon. Ĵetu la pilkon nun. Ĵetu! Ĵetu! Ĵetu!

*Kio mankas al vi de la arbaro?*

Mankas al mi bastonojn. Ĉu vi povas ĵeti bastonon? Ĵetu la bastonon nun. Ĵetu! Ĵetu! Ĵetu!

*Kion vi manĝis en la arbaro?*

Mi manĝis musojn. Ĉu vi iam gustumis musojn? Ili estas bongustaj. Sed, ĵetu por mi pilkon. Ĵetu la pilkon nun. Ĵetu! Ĵetu! Ĵetu!

*Kion vi volas esti kiam vi estos plenkreskulo?*

Mi ne scias -- eble televida stelulo. Sed ĵetu la pilkon! Ĵetu ĝin nun! Nun! Nun! Nun!

# Estraro Kaŝas Nenion

Post kelk-monata malfermiĝo de la agado de Esperanto-USA al la publiko, la estraro subite decidis refermi la arĥivon de mesaĝoj. Kelkaj atentigis ke la estraro volas kaŝi sian agadon kaj Filipo Dorcas, prezidanto de Esperanto-USA respondis.

"Ni kaŝas nenion," diris prezidanto Dorcas. "Fakte la estraro faris nenion dum la pasinta jaro. Do la arĥivo estas tute malplena. Sed eĉ se ni estus farinta ion, ĝi ne estus sekreta. Ĉio, kion ni faras estas malfermita al la publiko. Malgraŭ la fakto ke ni fermas la arĥivon nur al tiuj, kiujn ni enlasas."

Estas kelkaj kiuj ne konsentas. Renato Corsetti, antaŭa prezidanto de la Universala Esperanto Asocio skribis, "Eĉ se la arĥivo estis malplena, tio ne signifas ke ili faris nenion dum tuta jaro. Ili volas ke ni kredu ke la estraro de la usona Landa Esperanto-organizaĵo faris nenion dum la tuta jaro? Nenion? Ili vere faris nenion? Mi persone sciis ke ili faris kelkaj aferojn. Mi ricevis bondezirkarton de la prezidanto je kristnasko. Ĉu vi tion taksas nenio?"

## Lusi Harmon Motorciklistara Ĉefino



El Cerito

Okazis granda ŝoko kiam bildoj de Lusi Harmon aperis ĉe la gazetaro kiu montras ke la plena parto de ŝia korpo estas kovrita per tatuoj. Dum multaj jaroj, ŝi aperas publike nur kun la korpo plene kovrita. Fotografisto, kiu raportis pri motorcikla konferenco, faris kelkajn bildojn

Detaloj nun montriĝas ke Lusi Harmon havas duan vivon. Kvankam dumtage, Lusi Harmon estris vojaĝ- kaj flug-agentejo, dum nokte ŝi estris danĝeran motorciklistaron: la Verdaj Kranioj.

Dumlonge oni ligas la Verdajn Kraniojn al diversaj krimaj agadoj, inter ili paŝado sur la herbo, kaŝado de reklamkartetoj pri Esperanto en bibliotekajn librojn, kaj anstataŭigo de ŝampuo ĉe hoteloj per mansapo.

La polico neniam sukcesis akiri sufiĉan kialon por aresti ŝin -- neniu pretas testifiki pri ŝi.

Unu viro, kiu parolis al ni nur se ni kaŝos sian identecon diris, "Ŝi estas vere danĝera homo. Vi neniam volas lukti kun mia edzin... mi diru... tiu timiga virino. Tute ne eblas prognozi kion ŝi faros. Unu momenton, ŝi parolas afable kaj la sekvonta, Paŭ!" Li frapis pugnon en la manon por indiki ŝian teruran koleron.

# Oni Diras Nun!

http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/

Oni Diras Nun estas malofta sendependa eldonaĵo de la usona Esperanto-movado. Ni pretas diri ĉion -- eĉ la veron, se necese -- pri la sekretaj vivoj de la plej famaj esperantistoj. La redaktoro bonvenigas viajn demandojn, leterojn, "onidirojn" kaj fotojn. Sendu al D-ro Istvan Bierfaristo; Redaktoro <bierfaristo@comcast.net>

Oni Diras Nun!
ATTN: D-ro Istvan Bierfaristo; Redaktoro
5 Fairfield Street
Amherst, MA 01002